Ĉineske

(VIII)

e-Librigita de Elerno

jan. 2009

Busuanzi (Aŭguristo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.

Eto

Blanka Rubo

plastikaj aĵoj
kovras per noci'
kaj urbojn kaj kamparon
jen blanka magi'

jam homoj vivas
en blank-poluci'
la terglobo sufokas
jen en agoni'

Piedspuro en Neĝo

piedspur' en neĝ'
sterniĝas ĝis for'
kiu penas en ŝtormo
serĉi kun fervor'

en mia imag'
tiuj kun dolor'
en kor' manie serĉas

en neĝblanka glor’

Mandio

Sento de Korinklino

ŝia rigard’ min
faras ravita
ŝia rida mieno
al ĝoj’ invita

proksimiĝ’ al ŝi
kun sent’ hezita
min hantas iluzie
en mens’ medita

Sero

Verda Folio

mi volas esti
verda folio

en via viv’ mi drivas
kun emocio

mi ĝojas kun vi
je sunradio
mi verŝas tristajn larmojn
je velk-lilio

Yanke

Ponto

de sudo al nord’
alte arkas pont’
super granda rivero
fluante al front’

ĝi ligas inton
kun brila estont’
kuŝas pace kaj firme
ĉe pied’ de mont’

Promenado ĉe Lago

promenadas mi
sur vojo ĉe lag’
flavfolioj amasas
laŭ ĝia zigzag’

la bordo transe
malklaras en svag'
nur rebrilo ireblas
en mia imag'

Zhuang Qixiong

Legi Ĉineskon "Umefloro " de Maŭ Zedong

Jen laŭta laŭdo
en neĝa magi'.
Ne pompas,nur herolda
flor'----fiera di'?

Mont' bonodoras
kun printempa kri'.
De ĉarma vento
gracilas glaci'.

Caisangzi

(Moruskolektanta Knabino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

Eto

Enkaĝa Birdo

saltetas, ĉirpas birdo
triste en kaĝ'
sur teretag'
jen kiel hejma pejzaĝ'

ĝi baraktas al liber'
jam kun kuraĝ'
sen ajn domaĝ'
pri la almoza fromaĝ'

Chaitoufeng

(Feniksa Harpinglo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1*, 1* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bbxbBB kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

Vejdo

Sun' kaj Luno

bela sun'
jam en nun'
leviĝas el sabla dun'
la trankvil'
en april'
gravedas je
luma profil'
bril', bril' bril'

sorĉa lun'
de am-kun'
pendas en malhela brun'
hombabil'
ĉirpa gril'
kunfluas al
korus-simil'
tril', tril', tril'

Changxiangsi

(Longa Sopiro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 3, 3, 7, 5 silaboj kun kontinua rimo.

Yanke

Neĝo

neĝa flor'

kreskas por

blanka panorama glor'

per pena labor'

sen odor'

kun fervor'

kovras ĉion per memor'

de senta valor'

Chaozhongcuo

(Pedanta Klerulo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respktive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xxa,xa (x=senrima).

Eto

Amo de Neĝmonto

la neĝmonta sopiro
al amdeziro
kun blua ĉielo
sin montras per miro

pura sento
blanka sino
freŝa spiro
sin donas sincere
por amo-akiro

Yanke

Mi Ekamas Kafon

en ĉijara januar’
pro ĝia amar’
mi ekamas kafon
amas ĝin sen erar’

en soleco
akompanas
ĝi kiel par’
min nedisigeblas
jen en familiar’

Gaja Neĝfloko

mi estas gaja neĝflok’
de loko al lok’
mi flugas leĝere
je la homa alvok’

mi ne volas
flirti fale
al la montrok’
frostoreganta, sed
al brilhela loĝblok’

Daolianzi

(Kanto de Lavantino)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Niuniu

Sunleviĝo

elsaltas
ruĝa stri'
flambrula de incendi'
ore brilas marondoj
ludas per farba magi'

Sam

Ĉielarko

ĉielark'

la ponto

sepkolora ĉe monto

alte pendas impone

en bela duonrondo

Matena Roso

eta ros’
matena
sur petalo ĝardena
povas reflekti lumon
sunan en skalo plena

Yanke

Ĝoja Rojo

fluante
laŭ vojo
kantas lirle rojo
saltetas, torentetas
portas ridon kun ĝojo

Dianjiangchun

(Ruĝigitaj Lipoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)

Eto

Lasta Petalo

en aŭtuno
en venta kirla spiral'
roza petal'
kun flava vual'

drivas plume
flosa laŭ fatal'
senhelpe
malsupren al
morta festival'

Dielianhua

(Papilio Super Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,45,7,7 silaboj, laŭ rimarangĝo a,xa,a,a (x=senrima)

Eto

Konatiĝ' en Pluvo

kontraŭ pluv' por ŝirmi min
mi kaŭris sub
granda kron' de pin'
pluvo falis jen sen fin'
vento blovis kun obstin'

junul' je mia fascin'
la ombrelon
tenis kun korpklin'
sur min en trista destin'
mi ĝojis kun korinkin'

Fengrusong

(Vento Inter Pinoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xx (x=senrima)

Sam

Ama Degelo

sub arbombra malhelo
en venta pelo
ni subvoĉe kveradis
en kviet'
de fabelo
neniu nin ĝenis
per rigarda ŝtelo

sed nun l' ama mielo
jam per degelo
malaperis senspure
ĉu pro ŝia ŝancelo
aŭ ŝia perfido
per karna kruelo

Guizhixiang

(Aroma Laŭrbranĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 4, 54, 64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

Lily

Amoro en Vintro

ŝi en bikin'

en lito varma

brakumas min

korpglue intime

kun aminklin'

malgraŭ frido kaj glaci'

kunflirtas

ni kun obstin'

kaj karesas

kaj ŝmaclekas

jen en fascin'

eksukas ŝia vagin'

varme kaj glue

kvaz' vazelin'

mi glitigas mian

kacon en ŝin

violente skuadas

piŝtadas

mia kacpin'

jam ni sonĝe

ĝuas ĝoje

ja ĝis kulmin'

Haoshijin

(Proksimiĝas Bona Afero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)

Eto

Novjara Tago

en neĝo venas
al ni Novjara Tag'
kun printempa etos'
kaj bela imag'

sub spronado de tempo
ni penu per ag'
praktika, kun fervor'
malgraŭ vojzigzag'

Heyebei (Lotusfolia Taso)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2;3 silaboj, laŭ rimaranĝo aab,ccb

Eto

Lotusfloro

gracias lotusflor'
en glor'
de sunhel'
brilas rosgutoj sur ĝi
sen sci'
de ventpel'

Sero

Tagiĝo

malaperas sur mont'
ĉe front'
malhelo
kokerikas klare kok'
ĉe rok'
ĝis ŝvelo

Hexinlang

(Gratulo al Novedzo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 5,344,76,7,78,33 / 7,344,76,34,78,33 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xxa,xa,a,xa,xa / a, xxa, xa, xa, xa,xa (x=senrima)

Lily

Senforta Novedzo

ni jam en la lit'
je brakum'
ekscitiĝis
mi per manglit'
karesis lian kacon
li puŝis per evit'
min brulantan je ekscit'
tiam sentis mi l' kacon
softa sen ajn varma invit'
repuŝa
kun hezit'

mi penis pli per incit'
frotadi
lian kacon
sed sen merit'

sukcesis rigidi ĝin
volis vigli kun ŝvit'
li haste
por la koit'
sed vane, ĝi suplis tro
por bori truon per vizit'
ve, vera
emerit'

Huanxisha

(Silk-lava Rojo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po tri versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo aaa / xaa (x=senrima)

Sero

Rendevuo

ni venas por rendevu'
ĉe kvieta riverflu'
tiom trankvila sen bru'

nur softa dolĉa murmur'
ŝvebas inter koroj du
ŝvelas sento de am-ĝu'

Yanke

Furioza Tajfuno

leviĝas monstra tajfun'
rulas, falĉas trans la dun'
ŝaŭmoj frapas per grizbrun'

huloj, vento kaj ŝtormo
sin puŝas forte en kun'
kvazaŭ elĉiela pun'

Jiangnanchun

(Printempo Sude de Rivero)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Sam

Rivero en Printempo

printempe
la river'
el frosta katen'
fluas en liber'
ondas sub varma sunlum'
glimas kun brila fier'

ĝi portas
kun ĝojo
la verdan vivon
flue laŭ l' vojo
al arboj, herboj, floroj
al ĝermamta levkojo

ĝi fluas
kun esper'
al la sudlando
al vasta kampter'

por abunda rikolto
por fruktodona prosper'

Yanke

Urbo en Nebulo

la urbo
en svago
homplenas trae
kun vigla ago
la malklara vualo
alte pendas dum tago

trafiko
en nebul'
rampadas lante
kun langvora rul'
sonas hupoj laŭtvoĉe
por urĝigi per stimul'

nebula
la vual'
nure belas por
turist-festival'
sed por normala vivo
de loĝantoj ĝuste mal'

Jianzi Mulanhua

(Mallongigita Melodio

Magnolia)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.

Sero

Antaŭvespere de Kristnasko 2008

Nun tie ĉi
ĝoj' plenplenas en Ĉini'.
Juna popol'
orgias kun sang' en bol'.
Eĉ fremda fest'
furoras en ĉina vest'.
Ĉu la progres'
homa aŭ vigla eksces'?

Langtaosha

(Ondo Lavas Sablojn)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)

Eto

Promenado ĉe Vesperkrepusko

en milda zefir'
ruĝeta ŝmir'
tegas ĉielon per tir'
falas malhela vual'
por hejmenir'

fumo de kuir'
drivas en mir'
aŭdeblas nokta suspir'
alvokas min al poem'
jam per inspir'

Litingyan

(Hirundo ĉe Kiosko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 66, 76, 56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Eto

Soleca Atendo

ŝi ne al rendevu'
venis, nur mi unu
sidis sur benk' en parko
ĉirkaŭe krom rojflu'
regis tenebro
kaj infera malbru'

mi esperis ne plu
kredis sen ambigu'
ke ŝi certe perdiĝis
en sentimenta sku'
kaj ignoris min
en soleca enu'

Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 66,7,55 laŭ rimaranĝo xa,a,xa (x=senrima)

Niuniu

Pli Alten

mi volas pli alten
flugi per la raket'
puŝata de pulva ĵet'
por trovi l' bluon
supran en sekret'

mi volas pli altan
leviĝi kun impet'
por vidi per okulpret'
la homan mondon
de magia ret'

Manjianghong

(Rivero Plenruĝa)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x = senrima)

Mao Zedong

Responde al Kamarado Guo Moruo

Sur terglobet'
kelk muŝoj
kontraŭ la mur'
sin frapas
kun ploranta
trista murmur',
kvazaŭ formikoj blufas
pri skuad' de trunka dur'.
En vento
falas folioj
kun susur'.

Ĉiaĵo

dum tempkur’

ŝanĝiĝas

sen mezur’.

Jarmil’ tro longas,

gravas tuj’ nur.

Tumultas maroj monde,

vipas ŝtormo kun tortur’ .

Ekstermu

ĉiujn fiulojn

per sangĵur’.

Elĉinigis Vejdo

Nangezi (Suda Kanto)

ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Eto

Floro en Vento

skuas en vento
delikata flor'
elas ĝia bonodor'
falas petaloj en ruĝa glor'

tremas en vento
la flora anim'
ĝi murmuras kun deprim'
ĉu mi iras al morta proksim'

Sero

Pri Tombo

ĝi markas finon

de homa vivo

per memora arĥivo

ĉu en forges' aŭ impresivo

Niannujiao

(Ĉarma Kantistino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)

Lily

Amorado en Bankuvo

varma akvo
instigas
nin al impulsa hor'
lia kaco
erekta
jam glitas per esplor'
ir-reire
sur nuda korp'
eniras per bor'
li facile
pro akvpuŝa favor'

flosaj ni en akvo
ĝuas pistadon
de prema vor'
jen malsupren
jen supren

kun leviĝ’ de vapor’
li per forto
sin ŝovas krie
kun ĉur-trezor’
ĉe kuva fund’
ni kuŝas kun langvor’

Pozhenzi

(Kavalira Danco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)

Eto

Vintra Naĝado

En glacia river'
ondas akva frido.
Bravaj oldaj naĝantoj
sin ĵetas kun decido
kaj gaja rido.

Ili remas lerte
en akva rapido
kiel fiŝoj ludantaj
libere frid-insido.
Ha, kia vido!

Sam

Erarvaganta Penso

mi ne scias kiel
vagas pens' sur ĉiel'
kvazaŭ nubero drivas
ŝarĝoportante sen cel'
en nod' de fabel'

mi ne scias kiam
ĝi turnos en cerbĉel'
fore de ekstera ĝen'
kaj de vulgara pelmel'
fartos sen ribel'

Pusaman

(Budhista Dancisto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

Vejdo

Maljuna Arbo

staras arbo maljuna
en lumo duonluna
kun trunko nuda
ĉe lag' apuda

jam ĝi senviva
kun korp' masiva
hakon atendas
jam ne plu plendas

Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 13 versoj de 444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ rimaranĝo xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxa,xxa,xxa (x = senrima)

Eto

Virino Estas Akvo

ŝia amo

fluas lante

de ŝia kor'

al mia korpo

kiel akvo

saturiĝas

en ĉiu por'

mi fortege

sentas ene

varman injekton per bor'

mi scias

ke ŝi eniras

jam en ĉi hor'

akvumas per labor'

ŝi zorge

pene sen langvor'

korkampon mian

jen por gajni

la rikolton

de ama or'

mi kortuŝiĝas

mi ŝin dankas

pro ŝia bena favor'

por ĉiam

mi ŝin trezoras

en la memor'

Vejdo

Printempa Festo 2009

ĉiujare
tradicia

printempa fest’
kiel kutime
ĝoja etos’
franda regal’
kolora vest’
rekuniĝo
familia
kun anoj en varma nest’
prodigo
de granda sumo
el la ŝparkest’

sed nun embuskas pest’
financa
pelas per molest’
mondan popolon
al mizera
mon-dilema
cunam-tempest’
sed ne timu
antaŭ monstra
la ekonomia best’
rebatu
per sinergi’ por
homa majest’

Qingpingyue

(Serena Muziko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,5,7,7 / 6,6,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,a / a,a,xa (x = senrima)

Mandio

Fluta Ario

fluta ari'
kiel sunradi'
plukas koron kun magi'
taŭzas penson kun pasi'

kvazaŭ l' suko de am'
akvumus kampojn jam
sekiĝintajn longe
per kuraca balzam'

Queqiaoxian

(Feino sur Piga Ponto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 446, 734 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa (x=senrima)

Sam

Rekuniĝo post Disiĝo

Jam delonge
ni sopiris
al feliĉa kuno
post mizera disiĝo.
Kiel ni
do en nuno

agu dece,
kiam ambaŭ
ni sidas sub luno?
Ĉu kverado sufiĉas
por nia
flama juno?

Renyueyuan (Rondiĝo de Luno kaj Homoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj de 5 kaj 6 versoj respektive de 75,444 / 444,444 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xxa / xxa,xxa (x=senrima)

Sam

Rekuniĝo ĉe Novjara Tago

familianoj ĝoje
sidas en rondo
ĉe festeno
familia
por renkonto

vindrinkado
glastintado
manĝaĵ-monto
por bonfarto
por sano kaj
bela onto

Rumengling (Kvazaŭsonĝe)

ĉina fiksforma poemo el 7 versoj de 6,6,56,2,2,6 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,a,a. La kvina kaj sesa versoj estas samaj.

Sero

Koŝmaro

trafas min koŝmaro
falas kun amaro
en ŝliman marĉon
kun kotakva knaro
raro
raro
alkuras barbaro

Frida Nokto

falas nokto frida
kun frost' senbrida
en firma brakum'
kveras par' konfida
rida
rida
en parol' memfida

Shaonianyou

(Vojaĝo en Juneco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,5,445 /75,445 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa (x= senrima)

Eto

Vojaĝo de Amo

dum longa vojaĝ' de am'
mi spertadis jam
multe multe
da suferoj
sur vetura pram'

sed rikoltis nenion
en tiu ĉi dram'
ĉu daŭre peni
en la koro
kun brulanta flam'

Sam

Juna Kiel Vi

Okaze de mia 60-a naskiĝtago

Kiel vi kun verdkolor’
mi junas en kor’.
Mi dancadas
ĝoje kantas
kun granda fervor’.

Kiel vi kun vigla vol’
mi en ĉiu hor’
pene strebas
kaj klopodas
sen ajna langvor’.

Shengshengman

(Lanta Sontreniĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x = senrima)

Eto

Vundo en Koro

en la memor'
gravuriĝas
paseo de dolor'
amatino mia
kun firma vol'
faris ĵuron al mi
al ĉiel'
sen ajn dekor'
fariĝi
edzino
mia ĉe nupta hor'

sed je mia stupor'
perfidis
ŝi min, ve, kun ignor'
ŝi preferis

riĉulon kun trezor'
kaj forfuĝis pare
sekrete
al dista for'
ho, triste
mi lamentis kun sang-plor'

Lily

Stara Geiĝo

I.

mi en juli'
jam surhavis
jupon de slim-lini'
sidis en rendevu'
de fantazi'
li retenis ne plu
vidinte
min en pasi'
li forte
brakumis
min kun kor-incendi'

stariĝis kun ekkri'
apogis

min sur trunk' sen foli'
lia langо
lekadis en seri'
miajn lipojn milde
karese
kun seks-ebri'
langa ĝu'
kolapsis nin sen konsci'

II.

mi sentis nur
inter gamboj
lian kacon de dur'
mi tuj aspiris al
amor-vetur'
mia suk' jam fluis
libere
jen kun murmur'
mi petis
donaci
min per ĉiel-plezur'

el kalson-apertur'
lia kac'
eniris per glit-kur'
pistis supren
malsupren el femur'
piedfingre staris

mi skue
en am-trotur’
ĝemkrie
ĝis eruptis lia ĉur’

Shiliuziling

(Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Eto

Revo

rev'
flugas ronde kiel mev'
jen soben
jen per alta lev'

kun
revo mi ŝajne al jun'
revenas
de mava fortun'

mi
prefere ĝuus sen sci'
knabecon
alifoje kun pi'

Mandio

Skribe al Mia Filo

fil’
lernas fremdlande por bril’
estonta
mi jen per babil’

kun
vi volas je aĝ-aŭtun’
pri mia
esper’ al vi nun

per
pli grandanima sincer’
lernu de
homa bona kler’

vi
bonkondutu kun konsci’
neniel
perversu sen sci’

pri
de vi lernata meti’
perfektu
jen kun energi’

Sam

Amatino en Mia Sonĝo

ĉu
ŝi kisas en rendevu'
ensonĝe
min en rendevu

ĉu
ŝiaj mamoj per tremsku'
allogas
min al amor-ĝu'

ĉu
ŝi vekas min el enu'
kokete
per seksa instru'

ĉu
vere ekzistas ni du
reale
en sabla konstru'

nu
mi reve sonĝas ne plu
amatin'
sidas en vaku'

Tetrinkado

te’
infuzita en kruĉ’ de
argilo
bonodoras tre

ni
babilas kun energi’
trinkante
pri la poezi’

ĝoj’
lirle fluas kiel roj’
interne
de parola voj’

Sero

Lampiro

mir’
flagras en foli-suspir’
sendube
forflugis lampir’

lir’
sonas en vent-delir’
fone de
lampira forir’

Vejdo

Sunleviĝo

sur
la maro stria purpur’
pentriĝas
ĉirkaŭ sun’ kontur’

ond’
pelas ondon en la rond’
akvara
kun brileta brond’

sun’
elsaltas super sabl-dun’
prilume
per radia kun’

Shuidiaogetou

(Preludo de Akva Melodio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x = senrima)

Vejdo

Beata Neĝmonto

pura neĝmonto
sin lokas en for'
volvita rubande
per arĝenta glor'
la profunda mister'
sin kaŝas en la sin'
ja kiel trezor'
sopiranta al
homara esplor'

beata
impona
la honor'
jam igas min
preĝi al vi per ador'
timplene estima

mi jam kvazaŭ aŭdas
batadon de kor'
via ĝuste en
ĉimomenta hor'

Shuilongyin (Akva Drako)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de 67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x= senrima)

Niuniu

Fonto Klara

el monta kaverno
fluas fontakvo klara
lirle sona
hope salta
kun gitara
la muziko
ĝi invitas
al nektara
akva festeno
birdojn, brutojn
per vok' mal-
avara

la fonakvo kara
kun suko
sanitara
fluas kampen
kaj sulketen

malamara
akv' vivsava
humidigas
ĉionfara
la grundon sekan
kun magio
senkompara

Siyuanren

(Sopiro al Fora Homo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvin versoj de 75, 445 / 7,5,545 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xa,xxa / a, a, xxa (x=senrima).

Sero

Senlima Sopiro

mi estas obsedate
senlima sopir'
pri amatin'
en malproksim'
kun ofta suspir'

mia modesta dezir'
de malforta vir'
tamen ja restas
ne reala
ĝis mia korŝir'

Sumuzhe

(Virina Ĉapo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 7 versoj de 33, 45, 7,45 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a,xa (x= senrima)

Sam

Flavan Rozon al Vi

deŝiras
mi por vi
flavan rozon
kun folioj tri
kaj donas al vi kun pi'
ĉar vi ŝanĝas
jam kun apati'

la koron
jen al mi
mi neniam
petos kun pasi'
al vi jen por simpati'
mia kor' jam
mortis sen konsci'

Suzhongqing (Kora Sento)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)

Yanke

Sopire al Mia Amato

kvazaŭ en via brakum'
kantas mi kun zum'
ŝajne lulas mi en
via varma lum'

en mia
fot-album'
granda sum'
da remomor'
konserviĝas
sen ajn konsum'

Tasuoxing (Paŝo sur Herbo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 44,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa,a,xa (x=senrima)

Guozhu

Laŭdo al Cicio Mar

Cicio Mar
la talenta
poligloto prudenta
verkis "Montar-Vilaĝon"
per lerta plumo senta

li beletrist'
artprezenta(s)
"fabelaron" identa
"forgesitoj" plej bonas
pintas "Montar' Silenta"

notoj:
Cicio Mar estas plumnomo de Ye Junjian, ĉinaj famaj literaturisto, tradukisto kaj esperantisto.
"Fabelaro" aludas al Andersen Fabeloj, lia grava traduko.
Montar-Vilaĝo (Montara Vilaĝo), Forgesitoj (Forgesitaj Homoj) kaj Montar' Silenta estas liaj ĉefverkoj.

elĉinigis Vejdo

Tianxianzi (Fea Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 7,7,73,3,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,a (x=senrima)

Niuniu

Nubo de Hejmloko

ŝvebas nubo de hejmlok'
super apika montrok'
kvazaŭ ĝi al hejmenven'
per alvok'
per allog'
min urĝigas sen ajn mok'

Sam

Anĝelo

ĉu ŝi estas anĝelo
ĉarma kun brila belo
sed mankas al ŝi multo:
fidelo
korhelo
kaj puro de fabelo

Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Eto

Renkontiĝo

kune
kune
sidu ni sublune
babilad' libera
korelverŝo vera
rave
rave
korligiĝo grave

Soleco

sole
sole
ĉiam senkosole
rabia sureĝe
inflama subneĝe

ĝene
ĝene
tuttage ĉagrene

Sabla Ŝtormo

griza
griza
atako surpriza
de sabla blovo
kaj dezerta kovo
voko
voko
al sekura loko

Akcia Krizo

fale
fale
la prezoj fatale
sobis kun furioz'
ŝrumpas kiel sek-roz'
zorge
zorge
dolore surforke

Dorlotata Hundo

hundo
hundo
saltetas sur grundo
dome obeema
hejma ŝtono gema
ame
ame
por ni anoj same

Milito en Gazao

milit'
milit'
kiu estas bandit'?
landoj sangas kreve
fajro brulas leve
vee
vee
gentoj al-peree

Nubo

drive
drive
blanko movas vive
ĉu por dista amo

aŭ fuĝi kun lamo
mola
mola
ĝi nur flosas fola

Bova Jaro

nova
nova
venas jaro bova
ne ŝafece meku
sed antaŭen, eku
kune
kune
ni penu de nune

Ĉina Floto

brava
brava
ĉina flot' vivsava
bat' al grego blata
per ĉasado kata
atak'
atak'
al marratoj en sak'

Tujmanĝaĵo

facil’
facil’
manĝaĵoj frandaj mil
kun paper’ pak-uje
manĝu, manĝu tuje
ĵetu
ĵetu
la pakon formetu

Interreto

monde
monde
homoj kunas ronde
kunagas libere
kunĝuas surtere
rete
rete
akiras laŭpete

Miĉino

Lito

Lito, lito,
al ripoz' invito.

Dormu dolĉe, bone,
belsonĝu festone!
Nesto, nesto,
de ora tempresto

Niuniu

Al Fumanto

per suĉ'
per suĉ'
vi ĝuas en fumbuĉ'
buŝ' haladzas cepe
korpo ŝrumpas krepe
pere'
pere'
al vi proksimas tre

Sero

Ŝtormo

muĝe
muĝe
homoj iras fuĝe
kien ŝirme kuri?
al kie veturi?
iru

iru
pacajn preĝojn diru

Glavo

hake
hake
svingate atake
ĝi kun brilo flagra
ĝi kun eĝo akra
arka
arka
ĝia formo marka

Vejdo

Abomenindaj Piratoj

rabkrim’

rabkrim’

el mara malproksim’

piratad’ sentrema

sed neeltenema

damne

damne

krias mond’ komdamne

Kristnasko ĉe Krizo

ĝojfest’

krizpest’

mondon trafas molest’

prezoj altas leve

vivo mavas kreve

vere

vere

iras fest’ mizere

Ĝoja Festo

festo
festo
homoj en bunt-vesto
homplena pejzaĝo
homflua vojaĝo
ĝoja
ĝoja
rideto laŭvoja

Wanghaichao

(Rigardo al Martajdo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 446, 446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x = senrima)

Vejdo

Hejmen

ĉe printemp-fest'
tradicia
pretas por hejm-vetur'
laboristoj
en fremdlokoj
post lukra aventur'
kun magra figur'
ili survojas
per trajna kur'
kun bagaĝo
kun rekuniĝa plezur'

siblas varma murmur'
ŝvele en vagon'
pri gajnoj sur
laborposten'
kaj pri pena

irita piedspur’
ha, hejmsopir’ nur
vekas ĉe ili
eĥon de pur’
la anima
spite al enkor-tortur’

Xiangjianhuan

(Ĝojo de Intervidiĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimaranĝo aaa / bb,aa

Niuniu

Intima Babilado

en elkora babil'
paĉj' kaj fil'
komunikiĝas kun rida bril'

sincere
leĝere
pri milmil'
da detaloj en onta jubil'

Xiaochongshan

(Malgranda Montvico)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7, 53,7,35 /5,53,7,35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,xa (x=senrima)

Sero

Falĉi Sovaĝajn Herbojn

sovaĝherboj kun konspir'
volas okupi
pri ramp-ir'
vastan teron sen ajn gir'
gravedaj
jam je fi-aspir'

jen per mana tir'
jen per falĉado
de seg-ŝir'
homoj jen per unu spir'
senigas
ilin laŭ dezir'

Niuniu

Pado sur la Monto

zigzagas pado eta
jen tra arbaro
kvieta
jen tra herbej' koketa
kun svaga
spuro pieda

kun mit' sekreta
ĝi ja sin montras
rideta
al grimpanto diskreta
venu do
vi volo-preta

Frua Mateno

rosoj ĉe frua maten'
saturas verdon
en ĝarden'
floroj ridas sen ĉagren'
kaj herboj
skuas sen katen'

sunbrila alven'
forpelas svagon
de venen'
mi lantpaŝas en promen'
meze de
freŝiga festen'

Xijiangyue

(Luno super Okcidenta Rivero)

ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 66,7,6 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Eto

Sub Malhela Lunlumo

ambaŭ ni sidiĝis
sub luna malhelo
ĉirkaŭe nur ventpelo
siblis ĉe orelo

antaŭ mia amat'
penso en pelmelo
troviĝis sen ajn celo
ĉu ti' 'stas mielo?

Yanermei (Ĉarma Okulumo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj de 5 versoj de 7,5, 444 / 75,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa (x=senrima)

Mandio

Rideta Okulparo

okulparo rideta
via koketa
min altiras
al kolapso
ĉionĵeta

via ĉarma okulpar'
per fort' sekreta
min puŝegas
al ekstazo
mortopreta

Yexingchuan

(Nokta Ŝipvojaĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

Sero

Longa Nokto

mi turniĝadis lite
sendorme
ekscitite
pro rifuzo
ŝia de am'
ŝi eĉ senhezite

min humiligis spite
cerbumas
mi medite
kor-dolore
ve, tre longas
nokt' senintermite

Yijianmei

(Brancĉo da Umefloro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,44,744 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

Lily

Ploro sen Larmoj

I.

min renkontis lastjare
li kun amem'
kaj malŝpare
min karesis kaj kisis
kaj konsolis
ĵur-deklare

enlite ludis pare
ni ĝisĝue
senerare
li min eniris glite
por diboĉi
malavare

II.

gravedas monatojn tri
mi jam bone

sed mi sen sci’
atendas stulte nure
lian venon
kun emoci’

degelis kun apati’
li jam tamen
kiel glaci’
jen kun feto en ventro
mi suferis
en agoni’

III.

mi ja sangas en la kor’
ĉiutage
ĝeme per plor’
senlarma mi pasigis
tago-noktojn
en kor-dolor’

mi oferis per disflor’
min lojale
en lit-amor’
dum li perfidas simple
senhezite
min sen favor’

Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Eto

Ansero

ansero
kantas en solo
kun kapo al ĉielo
svingas la kurba kolo
grake kun folo

ansero
en blank-plumaro
per ruĝaj palm-pajacoj
remas ĝoje sen baro
en akva klaro

Niuniu

Vi kaj Mi

vi kaj mi
koron ĉe koro
vivas sur sama globo

por la songĝ’ ni el foro
venas kun gloro

al Pekin’
venu do, amik’
al impona renkontiĝ’
por la mondpaca praktik’
de roka fortik’

Sero

Sopire al Sudo

sudlando
en mia memor’:
fajre ruĝas akv-floroj
printempe flu’ en verd-glor’
kortuŝe al kor’

bona sud’
tiras min al ĝu’
ĉarmas pejzaĝo ĉie
prosperas verda bambu’
sorĉas dom-konstru’

bena lok’
invitas al vid’

sanbrilas junaj vangoj
olduloj vivas kun rid'
pro homa memfid'

Yanke

Vintro

I.

jam ploras

arboj en vento

tutnudaj ili skuas

korpon pri malkontento

kun tristlamento

II.

sunlumo

suplas pro laco

ĝi volas ripozeti

kuŝas rande de placo

por iom paco

III.

hompaŝoj
haste tra tero
malseka revenas al
varma brila karcero
sen frid-severo

IV.

birdetoj
silentas treme
kaŭrante sur tegmento
kelkaj sin puŝas preme
pepadas ĝeme

Yugezi (Fiŝista Kanto)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 7,7,33,7, silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a (x=senrima)

Mandio

Fiŝkapta Knabino

ĉe rivero la knabin'
kun vangoj de karmezin'
vadadas
kun korp-klin'
por retkapto de sardin'

dum sun' subiras en sven'
ŝi rikolton de malplen'
ekhavas
je ĉagren'
sin turnas al hejmreven'

Yulinling (Tintado en Pluvo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)

Lily

En Noktoklubo

mia klient'
vire fortas
per vinprezent'
min regalas sklave
pelas min ĝis
svena moment'
mi falas kanapen
tra malklara sent'
kaj kuŝas
sub korp-pezo
lia de impertinent'

per karesa fingra tent'
li frotas
piĉon en silent'
mian ir-reire
tujtuje
lia serpent'

eniras min
skue
kirlas sen ajn prudent'
ĝemkrie
mi obee
larmis kun lament'

Yumeiren (Belulino Yu)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

Mandio

Belulin' Koketa

ŝi iras kun svinga pug'
kvazaŭ birda flug'
ŝia puf-brust' altira
pikas koron de homo vira

ŝia seksalloga buŝ'
tiklas per ruĝ-duŝ'
ŝia vizaĝ' rideta
radias per rigard' koketa

Vejdo

Reĝidino sur Pizo

I.

Antaŭe vivis reĝid'
kun amo-avid'.
Edzinigi volis li
reĝidinon veran kun pasi'.

Tra l’ mondo li serĉadis
ĉie nomadis,
sed reĝidinon tian
ne trovis spite penon ĉian.

II.

Dum serĉado zorgema
io problema
ĉiam troviĝis certe
ĉe reĝidinoj laŭaserte.

Li perdis memfidon jam
pri serĉata am’:
ĉu ekzistas ja vere
tia reĝidino espere?

III.

Iunokte en pluvo
kiel diluvo
aŭdiĝis frap’ sur pordo
de la reĝa solena korto.

Reĝo maljuna iris
malferme tiris
la pordon senprokraste
por bonvenigi gaston haste.

IV.

Staris malseka princin’
je lia fascin’.
Pluvakv’ gutadis de har’
fluete ĝis ŝia piedpar’.

Ŝi deklaris mizere,
“Por diri vere,
mi estas aŭtentika
reĝidino senartifika.”

V.

Reĝino pensis en si,
“Post tempeto ni
tuj scios per kontrolo,
ĉu vi ja estas vera rolo.”

Ŝi restis senparola
kun kor’ malmola.
En litĉambron decide
ŝi tuje eniris memfide.

VI.

Ŝi forprenis el lito
jen sen hezito
ĉiujn kovrilojn tute
kaj littabulo kuŝis nude.

Ŝi pizon metis rule
jen surtabule
kovris sur ĝin en bonord'
per dudek matracoj el risort'

VII.

kaj dudek kusenoj el
lanuga leĝer'.
Do ŝi vokis per invit'
ŝin por nokte dormi en la lit'.

Je la posta mateno
venis sen ĝeno
la reĝino kun esplor'
demandi ĉe ŝia vekiĝhor',

VIII.

ĉu ŝi dormis komforte.
Ŝi mizervorte
respondis, "Mi dormis, ve,
malbone kaj malkomforte tre!

Preskaŭ l' tutan nokton mi
sentis sen konsci'
surdorse malmolaĵon,
mi eĉ ne fermis okulparon.

IX

Jen vidu, korpo mia
fariĝis tia,
kia batit' vundplena
kun bluaj makuloj malbenaj!"

Ĝis nun venis al kompren'
ĉiuj sen diven',
ke ŝi estas identa
la reĝidino centprocenta,

X.

ĉar ŝia delikata
haŭto beata
eĉ sentis pizon vere
tra tia dikaĵo sufere.

La reĝido plezure
prenis ŝin ĵure
kiel edzinon sian,
vivis vivon reĝfamilian.

laŭ fabelo de Andersen

Zhugutian (Pedrika Ĉielo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 7,7,77 / 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xa (x=senrima)

Vejdo

Viv-Vojaĝo

I.

belan sonĝon havis mi
knabece kun ambici'
por vojaĝi sur la mar'
per junplena energi'

tiam mi
sen konsci'
konis kiel antaŭ mi
malfacilas la viva
vojaĝ' en globa medi'

II.

dum junaĝ' mi al kompren'

venis pri hommonda ĝen’
en luktado dumviva
kaj en ŝvita entrepren’

pro tio
mi per pen’
strebis al viva festen’
por mi mem kaj famili’
sen ajn mizer’ nek ĉagren’

III.

dum mia viva aŭtun’
mi ’stas rafinita nun
sed min trafas malforto
kaj aga neoportun’

ne plu mi
viglas kun
viv’ kiel subira sun’
mia vojaĝ’ finiĝos
kune kun korpa maljun’

Zuihuajian

(Ebrio inter Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 4 versoj respektive de 3,3,5,55 / 5,5,55 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa / a,a,xa (x=senrima)

Vejdo

Amo sen Ornamo

vera am'
sen ornam'
brulas kiel flam'
en okulparoj
en esprima gam'

promesa proklam'
sen ajna dram'
ludas sur lipoj
de ni ambaŭ jam